

# La Progresanto

REDACTIE-

COMITE

G. P. DE BRUIN

G. J. DEGENKAMP

F. FAULHABER

**STUDIEBLAD VAN DE BOND  
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN  
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL**  
f 2.- per jaar; f 1.50 voor leden van F.L.E.  
Postgiro 331133

W. F. KRUIT

H. KUYT

JAC. LEM JR.

J. VAN SCHEEPEN

H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

## LA AKCENTO EN ESPERANTO

La akcento estas sur la antaŭlasta silabo. Pli facila regulo certe ne estas elpensebla. Tamen, por tiu kiu iom ekzakte okupas sin pri la lingvo, la afero de l' akcento estas malpli simpla ol ĝi ŝajnas laŭ la ĉi supra simpla regulo. Ni klopodos trakti tiun aferon sufiĉe vaste por kontentigi ĉiun interesaton. Sed antaŭe ni difinu la signifon de l' ideo „silabo“:

Silabo estas vorto aŭ vortparto konsistanta el unu vokalo sen aŭ kun unu aŭ pli da konsonantoj. Tiuj konsonantoj povas troviĝi antaŭ, post aŭ ambaŭflanke de la vokalo.

La divido de vorto en silabojn estas ĝenerale dumaniere: natura kaj gramatika. La natura estas la maniero, laŭ kiu oni plej facile, kvazaŭ per si mem dividus la vorton en silabojn, eĉ neniom sciante pri ilia gramatika konsisto, ekz.: *ver-ze-ke-ring*, *Es-pe-ran-to*. La gramatika estas la maniero dividi la vorton laŭ ĝiaj gramatikaj elementoj, ekz.: *pen-tr-ist-in-et-o*. En la pli multaj lingvoj ambaŭ manieroj jen interdiferencas, jen kongruas. Kelkfoje la naturo subpremas la gramatikon; nederlandanoj ekz. ofte silabas *vol-gor-de*, kvankam la gramatikaj elementoj estas *volg-orde*. En Esperanto oni povas apliki la naturan manieron ĉe ĉiuj vortoj, la gramatikan nur ĉe tiuj vortoj aŭ vortpartoj, kies ĉiu gramatika elemento estas nur

unusilaba. En la vorto „esperantistino“ do nur la parto „antistino“ estas gramatike dividebla en silabojn: *ant-ist-in-o*; la parto „esper“ nur laŭ la natura maniero: *es-per*. En nia pritrakto, kiu ne ampleksas la dividon de vorto ĉe la fino de linio, ni aplikas klarigojn nur laŭ la natura maniero.

Koncerne la pritrakton de l' akcentafero mem ni anticipe deklaras, ke ne estas nia intenco fiksi regulojn kiuj mankas en la Fundamento, kvankam ilian bezonatecon ni sentas. Ni konstatos nur faktojn kaj klopodos per konsiloj fari iom da ordo en evidentaj nekonsekvencaĵoj. En „Nederlanda Katoliko“ d-ro Manders, parolante pri la artefariteco de Esperanto, demandas i.a.: „Kaj ĉu vere la enkonduko de la unuforma akcento ne estas almenaŭ iomete artefarita?“ Ni opinias, ke efektive ĝi estas tia. Tion pruvas la fakto, ke jen kaj jen en la praktiko la naturo superas la artefaritecon.

Fiksante la akcenton sur la antaŭlasta silabo, Zamenhof sendube celis nur la ĉefan akcenton, ĉar vortoj havantaj pli ol tri silabojn ĝenerale havas kromakcenton, t.e. duan, malpli gravan, kiu laŭloke nur povas antaŭi la ĉefan akcenton. Tiu kromakcento povas havi du kaŭzojn:

Longaj nekunmetitaj vortoj kunportis tiun kromakcenton el la lingvoj, el kiuj

## VOOR ONZE CURSISTEN

Het zal onze beginnende lezers zeker verheugen te vernemen, dat met aanvang van het April-nummer de rubriek „Voor Beginners“ in het bijzonder aangepast zal worden aan de behoeften van hen, die juist een begincursus hebben doorlopen. Afdelingen verzoeken wij van dit nummer een aantal gratis exemplaren te bestellen voor hun cursisten. Met dit nummer zullen zij ongetwijfeld nieuwe abonneés winnen.

Esperanto ĉerpis tiujn vortojn, aŭ ili postulis tiun kromakcenton laŭ natura prononcmalmaniero. Tre malofte ni eraras pri la ĝusta akcentmalmaniero. Jen kelke da ekzemploj: *filozofio*, *matematiko*, *arĥitekturo*, *sentimento*, *sekretario*.

La duan kaŭzon ni vidas ĉe vortoj konsistantaj el diversaj gramatikaj elementoj, radikoj. Ĉe tiuj vortoj oni tamen konstatastas diversajn influojn laŭ la specoj de tiuj radikoj.

Se radiko ekhavas unu sufikson, la akcento forŝoviĝas de unu silabo al posta: *instrui* — *instruisto*, kaj tiu forŝoviĝo tuj kreas kromakcenton: *in-*.

Se ni aldonas duan sufikson, la akcento denove forŝoviĝas unu silabon: *instruisto* — *instruistino*. Se denove ni aldonas sufikson, ripetiga la sama procedo, sed tuj aldoniga dua kromakcento: *instruistino* — *instruistinetto*.

Tio estas natura regulo, pli ĝuste fenomeno, kiun oni konstatastas ĉiam, do ne bezonas lerni kiel regulon.

Se vorto minimume trisilaba ekhavas prefikson, tiu prefikso tuj postulas kromakcenton, ĉar inter tiu kromakcento kaj la ĉefa akcento ekzistas senakcenta silabo: *malfunkcii*, *senŝeligi*, *bogepatroj*. Ankaŭ tio estas natura fenomeno.

Ion strangan oni konstatastas ĉe vortoj kunmetitaj el radikoj neafiksaj. Jen la origina akcento de la unua vortparto konserviga kiel kromakcento, jen la kromakcenton akiras silabo antaŭe senakcenta. Tute nekonsvence oni do diras: *leter-kesto*, *vesper-mango*, *duoncirklo*, *naci-lingva*, sed: *paper-korbo*, *fier-senta*, *maten-horo*, *cigar-fumo*, *rapid-trajno*, *aer-tubo*, *ĉiel-arko*, *labor-tempo*, *miel-kuko*. Ĉe kelkaj vortoj oni aŭdas eĉ dumanieran akcenton: *popoldanco* aŭ *popol-danco*.

Ni opinias, ke la kromakcento korekte devas resti sur la akcentpostula silabo de la unua vortparto, do *popol-danco* (popolo — *danco*). Sed estas facile kompreneble, ke tiu kromakcento ŝoviĝas antaŭen, ĉar ĝi puŝiga kontraŭ la ĉefa akcento, kio difektas la ritmon en la vorto. Sed mirige estas, ke, kvankam preskaŭ ĉiu diras: *leter-kesto*, neniu analogie diras ankaŭ: *paper-korbo*, sed nepre: *paper-korbo*. Tion saman oni povas diri pri aliaj eĉ supre menciitaj vortoj. Ankaŭ tio estas motivo por nomi ekz. *maten-mango* pli korekta ol *maten-mango*. Se oni preferas konsekvencon de akcento, oni nepre elektu la unuan formon, ĉar ĝi ne sonas strange. Kontraŭe, *miel-kuko*, *labor-horo* sonas malagrabla.

Krom tio ni konstatastas, ke en kunmetitaj

vortoj kun „ali“ (*alimaniere*, *alitage*, *aliokaze*, *alikaze* k.s.), neniu emas akcenti *i*, sed diras: ali anstataŭ korekte: *ali*, eĉ se inter *i* kaj la ĉefa akcento ekzistas senakcenta silabo (*aliokaze*). Malgraŭ tiu ĝenerala kutimo oni ofte certiga al ni, ke la prononco ali sonas malagrabla. Jen do: denove la litero *i*, kiu kvazaŭ forpuŝas la akcenton, kvankam pro tio suferas la belsoneco. Se oni samopinia kiel ni pri la malbelsoneco de ali anstataŭ ali ni konsilas diri: *alia*: *aliamaniere*, *aliatepe*, *alitage*, *alihakaze* k.s. La interliga *a* ja estas permesebla same kiel *o* en legolibro; en flua parolo ĝi preskaŭ ne aŭdiga, tamen tiom influas la vorton, ke korekta prononco (*aliatepe*) fariiga facila kaj ne afekta aŭ nenatura.

Interesa estas la fakto, ke malgraŭ teoria absoluteco de la regulo pri la akcento en Esperanto, tiu regulo tamen montras praktikajn esceptojn, kiujn ni ne povas ne agnoski. Kiel simplajn ekzemplojn ni prenu la vortojn „bakforno, banŝuo, naztuko, poŝtuko, brakŝego“ kaj multajn aliajn kunmetitajn vortojn, en kiuj la unua, unusilaba radiko difinas la karakteron de la dua radiko. Ĉe natura prononco oni konstatastas, ke en tiuj vortoj la unua akcento (*bak-*, *ban-* k.t.p.) estas preskaŭ ĉiam pli forta ol la dua (teoria) akcento (*-forno*, *-tuko*). Tiu praktika akcento estas teorie neĝusta, sed nepre lasinda, ĉar postulata de la koncernataj vortoj mem. Eviti ĝin estus kontraŭi la naturon.

Sed eĉ intence oni kelkfoje agas kontraŭ la regulo pri la akcento. Por esprimi kontraston oni intence akcentas tiun vortparton, kiu indikas la kontraston. Tiu vortparto estas ofte la prefikso „mal“. Diru teorie korekte: „li ne estas *granda*, sed mal*granda*“ kaj vi konstatastas, ke la kontrasto tute mankas. Pro tio ĉiu, volante akcenti la kontraston, akcentas tiucele la prefikson „mal“ kaj diras: „li ne estas *granda*, sed mal*granda*.“

Similaj kontrastvortoj povas esti „*bopatro*“ (apud „*patro*“, kvankam „*bopatro*“ apud „*bopatrino*“), „*kvinpinta*“ apud „*seŝpinta*“, sed „*kvinpinta*“ apud „*kvinangula*“).

Same kiel vortparto postulas akcenton pro diversaj cirkonstancoj: akcenti ideon, esprimi kontraston, ankaŭ tuta vorto povas postuli apartan akcenton pro similaj cirkonstancoj, ekz. „la libro troviĝas ne *en*, sed *sur* la ŝranko“. Ne necesas klarigi tiun akcenton: Ĉiu sentas ĝian bezonatecon kaj tuj komprenas ĝian sencen.

## POR KOMENCANTOJ

H. Kuijt.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

• Trappen van vergelijking (Komparacio).

Bijvoeglijke naamwoorden (Adjektivoj)

De stellende trap (Pozitivo).

Twee zelfstandigheden kunnen dezelfde eigenschap bezitten, bijv.: Het schilderij is mooi en de tekening is mooi. Deze eigenschap (mooi) kan bij beide zelfstandigheden (schilderij en tekening) in dezelfde graad aanwezig zijn, bijv.: Het schilderij is even mooi als de tekening. In Esperanto: *La pentraĵo estas tiom bela kiel la desegnaĵo*. Of: *La pentraĵo estas tiel bela kiel la desegnaĵo*. Nog enige voorbeelden: *Mia patro estas tiom (tiel) dika, kiom (kiel) mia patrino*. *La kato de mia najbaro estas tiom (tiel) granda; kiom (kiel) via hundo*. *Tiom (Tiel) bonan viron, kiom (kiel) tiu ĉi, mi neniam antaŭe renkontis*.

De vergrotende trap (Komparativo).

Bij twee zelfstandigheden kan deze eigenschap ook in ongelijke graad aanwezig zijn, bijv.: Het schilderij is mooier (minder mooi) dan de tekening. *La pentraĵo estas pli (malpli) bela ol la desegnaĵo*.

In het Nederlands zegt men: Van die twee jongens is Piet de grootste (kleinste). Men gebruikt hier bij het vergelijken van twee zelfstandigheden de overtreffende trap. Dit doet men in Esperanto niet en vertaalt bovenstaande zin als volgt: *El tiuj du knaboj Petro estas la pli (malpli) granda*. Nog enige voorbeelden: *La pli granda el tiuj du sinjoroj estas mia instruisto*. *El tiuj du seĝoj, la ruĝa estas la malpli moderna*. Opm.: Het Nederl. woord „van” in dergelijke zinnen wordt vertaald met „el”.

De overtreffende trap (Superlativo).

Ook meer dan twee zelfstandigheden kunnen dezelfde eigenschap bezitten. Deze eigenschap kan bij een van hen in de hoogste graad aanwezig zijn, bijv.: Van mijn drie knechts is Jan het ijverigst. *El miaj tri servistoj Johano estas la plej diligenta*. Nog enige voorbeelden: *El ĉiuj lernantoj ĉi tiu estas la plej laborema*. *El ĉiuj lingvoj Esperanto estas la malplej malfacila*.

Bijwoorden (Adverboj)

De stellende trap.

Twee zelfstandigheden kunnen dezelfde handeling verrichten; ook de manier

waarop een handeling geschiedt kan men vergelijken, bijv.: Jan schrijft even mooi als Piet. *Johano skribas tiel bele, kiel Petro*. Andere voorbeelden: *Studu tiel diligente, kiel vi kapablas! Tiel longe paroli kiel li, mi ne ŝatas*.

De vergrotende trap.

Mijn vader leest vaker dan mijn moeder. *Mi patro legas pli ofte ol mia patrino*. Nog een voorbeeld: *Pli bele skribi ol li, mi ne kapablas*.

De overtreffende trap:

Van alle vruchten houd ik het meest van sinaasappelen. *El ĉiuj fruktoj mi plej (multe) ŝatas oranĝojn*. *El ĉiuj miaj parencoj mi plej (malplej) amas mian avinon*. Opm.: Heeft *plej (malplej)* betrekking op een bijvoegl. naamwoord, dan gebruikt men het lidwoord; dit gebruikt men niet bij bijwoorden, bijv.: *la plej (malplej) ...a*, maar: *plej (malplej) ...e*.

Ter vertaling. Opgave 3.

Jan is even groot als zijn vader; over enkele jaren zal hij ook even sterk zijn. De winkelier bood mij twee boeken aan; ik kocht het dikste. U bent een veel bekwaamere esperantist dan ik; men heeft U beter onderwezen. Ik vind het boek „La Faraono” het best vertaalde Esperanto-werk. Van al mijn cursisten is Piet het minst ijverig. Hoe meer men zich oefent, des te groter zal het succes zijn. Nu eens is lezen mijn meest geliefde bezigheid, dan weer vertalen.

Vertaling van opgave 1.

La infano jetas la pilkon kontraŭ 1) la fenestron 2). Post longa vojaĝo la patro venis hejmen 3). La kvinan horon 4) la laboristoj iras el la fabriko 5). „Kien vi iras?” „Mi iras en la arbaron; tie estas bele 6). Oni konstruis ponton trans la kanalon 7). „Johano, pendigu 8) vian surtuton en la ŝrankon kaj metu vian ĉapelon sur la breton 9)!” „Mia surtuto jam pendas en la ŝranko, Patro, sed mian ĉapelon mi forgesis.” Trans la rivero loĝas mia frato. „Ne restu hejme, ĉe tiom 10) bela vetero; iru eksteren!” Ekstere estas belege 5). Pro 11) mia rapidego mi forgesis pagi; la kernero kuris post min 12). Anseroj iras unu post alia.

1) Niet: *sur, al*; *al* drukt wel de richting uit, maar niet het bereiken. 2) Niet zonder richting-N; men vergelijke: *La urbdomo staras kontraŭ la katedralo*. 3) Niet zonder N. 4) Ook: *Je la kvina horo*. Niet zonder lidwoord. 5) Niet met N; na



## DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

Jac. Lem

Zoveel hoofden, zoveel zinnen.  
Zonder onnodige omhaal.  
Tot over zijn oren in de schuld zitten.  
Breedsprakerigheid.  
Aan de grote klok hangen.  
In geval van uiterste nood.  
De teerling is geworpen.  
Op hete kolen zitten.  
Stille wateren hebben diepe gronden.  
Een middel vinden om zich er uit te redden.  
Het botert niet erg tussen die twee.  
Naar de zin maken.  
Het uiterste nippertje.

Opgave 3. Vertaal in Esperanto:

1. Het verwondert mij niet, dat zij van elkander zijn afgegaan (disigi; forlasi unu la alian); het boterde al lang niet tussen die twee. 2. Wees voorzichtig; leen hem geen geld; je krijgt het nooit van hem terug, want hij zit tot over zijn oren in de schuld. 3. De teerling is geworpen; het besluit is onherroepelijk; laten wij dus trachten het beste er van te maken. 4. Waarom kom je toch zo laat? Wij zitten op hete kolen; de trein staat op het punt van vertrekken; je komt altijd op het uiterste nippertje. 5. Dit pakket alleen in geval van uiterste nood openen. 6. Ieder, ook u en ik, heeft zijn gebreken; hang daarom de fouten van anderen niet dadelijk aan de grote klok. 7. Het is onmogelijk het iedereen naar de zin te maken; zoveel hoofden, zoveel zinnen. 8. Die jongen is handig genoeg; hij zal wel een middel vinden om zich er uit te redden. 9. Vertel mij zonder onnodige omhaal wat er gebeurd is; breedsprakerigheid kan slechts tot misverstand leiden. 10. Mijnheer G. was een jonge rechter. Hij was zeer kalm en bescheiden. Stille wateren hebben diepe gronden en bescheidenheid verbergt vaak een krachtig (firma) zelfvertrouwen.

de voorzetsels „al, ĝis, de, el” kan men geen richtings-N bezigen. 6) Niet: *bela*; dit is een onpersoonlijke zin, d.w.z. er is geen onderwerp te noemen dat een eigenschap zou bezitten. 7) Niet zonder N; men vergelijkte: *Trans la kanalo loĝas mia frato*. 8) Niet: *pendu*; d.i. een onovergankelijk werkwoord, zie „La Pr.” Sept. j.l. 9) Niet: *tabulon*, d.i. uithangbord, schrijfbord. *Breto* = plank om iets op te zetten. 10) Ook wel: *tia*, maar dan staat dit los naast *bela*, heeft hierop dus geen betrekking. 11) Niet: *Pri*; d.i.

Kiom de kapoj, tiom da opinioj. En ĉiu kranio regas aparta opinio.  
Sen superflua balasto.  
Sidi en ŝuldoj ĝis super la sultroj.  
Multvorteco.  
Fari el io ion publikan.  
En okazo de ekstrema bezono.  
La loto estas tiritita. La jeto estas jetita.  
Sidi kiel sur ruĝardaj karboj.  
Trankvilaj akvoj estas profundaj.  
Trovu rimedon por elturniĝo.  
La rilatoj inter ambaŭ ne estas bonegaj Kontentigi. (tre bonaj).  
La lasta momento.

Vertaling van opgave 2.

1. Li klopodis trompi min, sed mi superuzis lin. 2. Kara amiko, per kio mi povas esti utila al vi? 3. Vi ne klopodu liberigi (liberigi vin) de ĉio per nenio kaj prokrasti ĉion ĝis Sankta Neniamo. 4. Ke ni ne samopinias (ne havas saman opinion), mi povas kompreni; sed ke vi ofendas min, tio ne pasos por vi senrezultate (tion mi ne toleras). 5. Kiam tiu fripono venos antaŭ miajn okulojn, mi faros al li solidan moralinstruon (Kiam mi renkontos tiun friponon, mi severe riproĉos lin). 6. Malriĉeco ne estas malvirta (malhonoro), sed ĝi ofte estas tre ĝena (ĝi ofte tre ĝenas). 7. Ho, tio ja superas (transiras) ĉiujn limojn; vi mensogas kiel kalendara (gazeto) (tiel, ke la muroj krakas)! 8. Kara mia, kiom pala vi estas! Kio estas al vi? Ĉu vi estis malsana? Jes, mi estis tre malsana, sed nun mi iom post iom reformiĝas. 9. Ne senpacienciĝu (malpacienciĝu), se vi ne tuj sukcesas: post domaĝo venos saĝo. 10. Ŝajnas al mi, ke vi preferu ne faru tion; pli facile estas malbonon eviti, ol korekti (pli bone estas ne fari, ol erari).

Bonvolu korekti: Vertaling van opgave 1, pagu 12a, dua kolono, Ila linio de supre: post kiam d.e. post kio.

betreffende. 12) Niet: *postsekvis min*; „post” is hier een pleonasme (overbodige herhaling); *sekvi* = volgen, zegt niet, dat het doel „inhalen” is. Niet: *posten*, d.i. naar achteren, achteruit.

Beoordeling: H. J. H. te B. 8; Astor 9; J. R. te A. 9; G. B. N. te Z. 6; G. A. te R. 8; U. S. te G. 9; J. B. te G. 7; A. A. D. te Z. 10; R. W. W. te G. 8; C. v. B. te S. 7; E. A. B. te A. 9; P. W.-V. te Z. 7; L. H. P. te R. 8; A. B. te A. 9; D. K. te Z. 9.



## POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 3. Vertaal in Esperanto:

SCHOONMAAKTIJD.

Tegenover de poëzie van de eerste lentedagen staat het proza van de schoonmaaktijd. Er wordt door mannen veel kwaad van de schoonmaak gezegd. De goeddelijke laat het bij onschuldige spot, de onvriendelijke mompelt van schoonmaakwoede, de ijdele, die zich verwaarloosd en achterafgezet voelt, maakt smalende opmerkingen over de heerschappij der vrouw. Maar allen hunkeren als kinderen naar hun oude, veilige plekje en de oude gezelligheid. Het is natuurlijk dwaasheid het te doen voorkomen of de schoonmaak opzettelijk is ingesteld om te mannen het leven te vergallen, terwijl de vrouwen zwelgen in genot. Als vele huismoeders na een zware dag 's avonds zo moe zijn, dat het heel moeilijk valt nog belangstelling te tonen in allerlei zaken van de man, dan is dat toch niet voor de pret. Een flinke huisvrouw acht echter de grote schoonmaak een onafwijsbare plicht, die zo goed mogelijk moet worden vervuld. Zoals elke plicht. En het is heerlijk, als alles er weer fris en helder uitziet!

Vertaling van opgave 1.

En la 16a 1) jarcento 2) procesoj pri sorĉado 3) ankoraŭ ofte 4) okazis 5) Weyer el Kleef energie kontraŭstaris 6) ilin, pruvis 7) ke la diferencoj 8) esploroj 9) faritaj al 10) suspektataj personoj estas 11) senvaloraj 12) kaj ke al ili mankas 13) ĉiu ajn konvinka forto. Li estis heroo (spirite) multe antaŭanta 14) sian epokon 15), kaj ĉiajn 16) nerv(em)ajn aper(aj)ojn 17) li kapablis 18) bone solvi. Li sukcesis savi el torturoj kaj la morto multajn viktimojn 19) kiujn oni estis oferonta 20) pro la kredo pri herezo kaj alianco 21) kun la diablido 22). Persekuto estas lia rekompenco 23), oni detruas lian hejmon 24) kaj post lia morto oni insultas lin venenisto kaj diablido. Daŭris 25) ankoraŭ ĝis 1782a, antaŭ kiam por la lasta fojo oni (pun)bruligis sorĉistinojn. Dr. R. E. W.

1) Voluit geschreven: dek-sesa. 2.) Niet: centjaro. 3) Beter dan sorĉistinoj. 4) Ook: regule, plurfoje. 5) Ook: havis lokon. 6) Ook: kontraŭstaris, protestis, rezistis, oponis kontraŭ. 5) Ook: mon-

tris. 8) Ook: diversaj, pluraj. 9) Ook: ekzamenoj, provoj, eksperimentoj. 10) Ook: kiujn oni faris al, aplikis al. 11) De tijd van de directe rede. 12) Ook: sensigntaj. 13) Ook: ke ili ne havas iun ajn. 14) Niet: antaŭante, d.i. terwijl hij zijn tijd vooruit was. Ook: kiu antaŭis, anticipis. 15) Ook: tempon, antaŭis siajn samtempanojn. 16) Ook: ĉiujn ajn. 17) Ook: nervozajn simptomojn, fenomenojn. 18) Ook: sciis. 19) Ook: multegon da viktimoj, minacatan al oferando. Niet: minacataj, want dit woord heeft betrekking op „multegon”. 20) Ook: kiuj estis minacataj esti oferataj, hoewel zeker niet erg vloeiend. Niet: kiuj estus. 21) Ook: interligo, interlig(it)eco. 22) Ook: satano. 23) Ook: parto, sorto. Niet: lotajo. De verleden tijd kan ook gebruikt worden. 24) Ook: domon. 25) Niet: devis daŭri. Het was geen plicht.

Beoordeling: H. J. H. te B. 7; Astor 6; J. M. T. te Dev. 6; A. D. te Z. 6; V. Elsans 7; F v. d. M. te U. 7; A. B. te A. 7; P. G. te G. 8; A. L. te G. 9; Kriplulo 7; Paruo 8; A. B. te A. 7; E. B. de A'd. 7; J. R. te A'd. 7; L. P. te R'd. 6; G. A. te R'd. 6; P. W. te Gr. 5.

## TRA NIA LITERATURO

FABLOJ. Jean de la Fontaine. Trad. Lucien Thévenin.

Ĝi estas libreto kun traduko de serio el la konataj fabloj de J. de la Fontaine. La fablo instruas al ni la moralon en diversaj formoj. La tradukinto estas lerta esperantisto, kiu scias manipuli per nia lingvo, kaj liaj tradukoj estas bonaj. Trovitajn kritikindaĵojn ni ne rajtas pri-trakti sammaniere kiel ni kutimas fari en prozo.

La poema formo ja postulas aliajn normojn. Laŭ tiu vidpunkto ni povas ja akcepti ekz.: „kunasociulo” (13) pro la rimo kun „kalkulo”; sed ĉu „trinki akvan puron” (17) anstataŭ „trinki puran akvon” estas defendebla, ni jam pridubas. Evitebla estas la nekonsekveneco: „tiel bela” (19) „tiom lerte” (23). Neelparolebla estas: „de akv' terura” (72) kaj gramatike ne tute ĝusta, kvankam ĉe pluraj esperantistoj trovebla estas: „sen diri” (13). Malfortajn rimojn konsistigas *ad' — ad'; ef' — e'* k.t.p. Akceptindaj ŝajnas la duonrimoj kiaj: *verde — certe* (15); *feliĉo — moligo* (13) k.t.p. Entute rekomendinda verketo.

J. v. Scheepen.

## LINGVAJ OPINIOJ EL NIA LEGANTARO

Nia tasko estas instrui kaj konsili en plejeble vasta senco. Por plenumi tiun taskon perfekte, nia redakcio devus konsisti el kompetentuloj el ĉiaj profesiaj kaj fakaj terenoj. Bedaŭrinde ni ne troviĝas en tia ideala stato! Pro tio ni volonte akceptas lingvajn opiniojn el nia legantaro, precipe koncerne t.n. fakajn aferojn.

Krome, ĉar el interŝanĝo de opinioj ofte rezultas pli ĝusta kompreno, ni volonte cedos spacon ankaŭ al legantoj, kiuj pri iu ajn detalo ne samopiniis kiel ni.

S-ro H. A. de Hoog informas nin, ke efektive „kruidnootjes“ kaj „pepernoten“ estas du diferencaj bakajoj, kaj li rekomendas kiel tradukon por la lastaj „klaŭsbuletoj“ aŭ „klaŭsnuksoj“. Ni dankas pro la informo, kiun la vortaro de Koenen ne povis havigi al ni, kvankam ni iom skrupulas kontraŭ la nomo „klaŭs, malpli „Esperanta“ ol „Nikolao“. K-do Derieuw havas alian opinion pri kelkaj aferoj traktitaj en L.P. Unue li opinias, ke „at“ en „bezonata“ estas pleonasma, ĉar „bezona“ kaj „bezonata“ signifas la saman. Li tamen malpravas. Adjektivo derivita de transitiva verbo havas aktivan signifon. „Bezona“ do estas: nodig hebbend, same: „informa“ = inlichtend; „trompa“ = bedrieglijk.

Por formi la respektivajn pasivajn signifojn „nodig, ingelicht, bedrogen“ oni aldonu la partician sufikson „at“ aŭ „it“, do: bezonata, informita, trompat(it)a“. Ke praktike oni ofte uzas „bezona“ kun la signifo „nodig, benodigd“ neniel ŝanĝas tiun fakton.

Due, k-do D. opinias, ke por „boorschaaft“ la traduko „borrabotilo“ pli taŭgas, kaj por „schuine-kantschaaf“: „klinranda rabotilo“ aŭ „klinrandigilo“ (P.V.). Ne havante kompetenton pri la ĉarpentista profesio, ni volonte akceptas liajn klarigojn.

Trie li havigas du aliajn tradukojn por „opklapbed“: „falda lito“ aŭ „aŭtomate falda lito“ kaj „klaba lito“. La unua ŝajnas al ni bonega; la lasta ne taŭgas, ĉar „klabo“ estas ia bastono kun dika finaĵo (knots).

Kvare, k-do D. ne estas kontenta pri la traduko „la knabino portas ridige malgrandan ĉapeleton“, ĉar „porti“ estas miskompreniga. Efektive, li pravus; ŝi povus porti la ĉapeleton ekzemple en ŝtato subbrake. Nepra korekta estas „... estas vestita per...“ Tamen, uzante „porti“ tiufraze, ni estas certaj, ke ĉiuj tuj komprenas. Oni trovas la ĉapeleton ridiga, amuza aŭ komika ja ĝuste tial, ke ŝi portas ĝin surkape.

Daŭrigo

## NEOLOGISMOJ

Kolektis k-do Chr. Slijper.

*tenera*, karesema, mola (zacht, lieflijk, tenger, fijn, teer)

*tohwabohuo* x, konfuza bruego (lawaa) *torporo*, sensentiĝo (verstijving, gevoel-loosheid)

*trahomo*, ia okulmalsano, trachoom)

*traumatologio*, scienco pri vundiĝoj

*tumano*, armena monero

*uzino*, granda fabriko (fabriekscomplex)

*vertiĝo*, kapturiniĝo (duizeling)

*vinkto*, fera najlo kun larĝa kapo por kunigi ferajn pecojn martele aŭ maŝine (klinknaĝel)

Neologismoj kolektitaj de k-do

J. Derieuw

*agreso*, ataka aĝo, aggresie, aanvallend optreden)

*aprovizio*, provizado (bevoorrading)

*avanco*, antaŭenmoviĝo (voorsprong)

*blankbekulo* (snotneus; france: blanc-bec)

*bunkro*, malgranda fortikaĵo (bunker)

*ej!* (hel)

*eksfulso*, forpelo (uitdrijving, verjaging)

*evoki*, spirite imagi (voor de geest roepen)

*faniastika* x, fantaziega (fantastisch)

*ĉatraso*, aĉajaro (rommel)

*intensiva*, intensa (intensief)

*insurekcio*, ribelo (muitelij, opstand)

*kamufli*, fari ion nerekoncible per lerta imitado de la ĉirkaŭo (camoufleren)

*koŝmaro*, inkubsonĝo (nachtmerrie)

*kvintalo*, pesila unuo, 50 aŭ 100 hgr.

*lanta* x, malrapide (traag)

*lakteska*, laktosimila

*nomumi*, nomi (benoemen)

*obteni*, pete aŭ pene akiri (verkrijgen)

*okupacio*, milita okupo (bezetting)

*peticio*, oficiala peto (verzoekschrift)

*Plejado* (Plejaden, zevengesternte)

*reklamacio*, formala plendo, reclamatie,

bezwaarschrift

*reviŝdiko*, postulo pri rehavigo (terug-eising)

*restutio*, redono, repaĝo (vergoeding)

*stabila* neŝanĝiĝema (stabiel)

*sturmi*, kurataki (stormen)

*trukado*, artifikado (trucs uithalen)

*vojevodio*, iama gubernio en Polio kaj

Rumanio (wojwodschap)

## KVARONJARO

En la artikolo „Centjaro-Jarcento” en la februara numero mi legas: „Kia jaro? Kvarona. Do kvarona jaro aŭ kvaronjaro.”

La konkludiga „do” povas konduki al la erara koncepto, ke tia kunmeto de substantivo kun epiteta adjektivo estas regula. Kunmetaĵojn tiajn certe neniu rigardas regulaj. Per la sama sorĉa „do” oni povus defendi la kunmetaĵojn „belinfano, diklibro, grandurbo, profundabismo” k.t.p.; nur pro belsono ni devus iakaze uzi la adjektivajn finaĵojn.

Se tiu konsekvenco ne estas akceptata de tiu, kiu verkis la artikolon, mi kredas, ke lia defendo de la vorto kvaronjaro distalas.

Ĉu estas tre grava la malapero de „kvaronjaro”, se ni volonte oferas la tradician „centjaro”, kiu kredeble naskis ĝin? Pri „centjaro” la opinio de Kalocsay kaj tiu de la verkinto ne tiom diferencas, kiom povus kredi la leganto de la artikolo. Klaringinte, ke la analizo akceptebla de tiaj kunmetaĵoj estas komplikita, Kalocsay daŭrigas: „Tial oni ankaŭ ne formas tiajn vortkunmetaĵojn ĝenerale: la troa komplikeco estas malhelpo por kutima uzado. Oni do *ne diras* (mi kursivas): „dubrdoj, centhomo, kvarlibro”, sed „du birdoj, cent homoj, kvar libroj”. (Kompl. Gram. par. 41).

J. M. J. Driesen

Al nia vorteto „do” en la koncernata artikoleto s-ro Driesen atribuis tro gravan signifon. Ni uzis ĝin nur por klarigi la sencon de „kvarona jaro”. Nia aldono „aŭ kvaronjaro” ne signifas, ke ni defendas la kunmetaĵojn „belinfano, diklibro” k.s., ĉar nia klarigo ne estis bazita sur adjektiva senco de „kvaron”. S-ro Driesen ne atentis, ke „kvarona” origine ne estas adjektivo kiel „bela, dika” k.t.p., sed havas substantivan signifon. „Kvarona” estas nur derivaĵo. Nia defendo do ne distalas sen la vorteto „do”.

Pro tio ni ne vidas motivon por oferi la kunmetaĵojn „kvaronjaro”. Ni konsciu, ke per tio ni devus konsekvence oferi kelke da praktikaj vortoj ekz. „kvaronhoro, duonhoro, duonlumo, duoncirklo, duoncendo”, kio ŝajnas al ni pli perdo ol gajno.

Due, ni certe ne reklamos kunmetaĵojn el substantivo kun epiteta adjektivo, sed malgraŭ tio konfesas, ke principe ni ankaŭ ne kontraŭas iun. Sed pri tio en posta artikolo.

Trie, principe tamen ekzistas distanco inter la opinio de Kalocsay kaj la nia pri kunmetaĵoj kia „centjaro”. Kalocsay evidente starigis regulon por motivi tiujn neregulaĵojn, kvankam li ne reklamas tiun regulon. Ni eĉ ne akceptas tiun regulon, sed prefere klarigas tiujn kunmetaĵojn aliamaniere. Per tia regulo ni kreus balaston en nia gramatiko. Red.

## HOE KAN MEN HET IN ESPERANTO ZEGGEN! (Vervolg)

Uitdrukkingen verzameld door  
M. E. Nawijn.

Breek je niet vruchteloos het hoofd.  
Wat denk je, aan wie het hoorde?

God helpe mij!

Och, help hem, goede God!

Men zou eerder kunnen zeggen, dat men  
zich hoog in de hoogte bevond.

In zo'n geval kan men hopen, dat de  
herinnering aan een groot man zijn dood  
een half jaar zal overleven.

De ongelukkige minister spande al zijn  
krachten in.

... kon men de zon zien, die haar licht  
naar alle kanten zond.

Deze begon haar zo kwaadaardig aan  
te blaffen, dat...

En leven op kosten van de staat.

... laten wij voorlopig helemaal liggen.  
Laten wij daar niet over doorgaan.

Wie is deze melkmuil?

Gij huurlingen meet dikwijls met twee  
maten.

Voor verklaringen der letters zie vorig  
nummer.

Ne rompu al vi vane la kapon. (H 145)  
Kiel vi pensas, al kiu ĝi apartenis? (H  
150)

Dio helpu al mi! (FK 20)

Ho, helpu al li, bona Dio! (H 78)

Oni povus diri, ke oni sin trovas alte  
supre. (FK 36)

En tia okazo oni povas esperi, ke la  
memoro de granda homo per duonjaro  
supervivos lian morton. (H 85)

La malfeliĉa ministro uzis ĉiujn fortojn.  
(FK 20)

... oni povis vidi la sunon, el kiu venis  
lumo ĉirkaŭen. (FK 36)

Tiu ĉi komencis tiel furioze ŝin boji,  
ke... (FK 39)

Kaj vivas je la kosto de la ŝtato. (FIII  
44)

... ni provizore lasos tute flanke. (E 5)  
Ni lasu tion. (D 6)

Kiu estas ĉi tiu flavbekulo? (FI 85)

Vi kortegaj homoj ofte uzas du mezurojn.  
(FIII 121)

## LA EKZAMENAJ FAKOJ

Ne nur A-kandidatoj bezonas konsilojn por eviti al si senluziigon en la ekzameno, ankaŭ B-kandidatoj post la ekzameno ofte konfesas: „Se mi estus sciinta, ke..., mi certe povus eviti mian malsukceson.” Pro tio ni opinias konsilinde daŭrigi tiun artikolan serion por la B-studentoj.

Antaŭ ĉio ni atentigu pri la granda distanco, kiu ekzistas inter la A- kaj B-postuloj, el kio rezultas, ke por A la ekzamenanto povas juĝi iom indulge, ĉar tiu diplomo atestas nur pri ĝenerala, ne tre ampleksa scio pri la lingvo. Por B indulgemo ne konvenas, ĉar ĝi malaltigus la valoron de la diplomo. Oni konsciu, ke la B-diplomo atestas fundan scion pri la lingvo kaj kapablon instrui ĝin, kio implicas, ke la diplomito havu sufiĉe vastan scion ankaŭ pri la literaturo, la historio kaj la movado de Esperanto.

Oni komprenas el tio, ke ne estas konsilinde jam baldaŭ post akiro de la A-diplomo partopreni B-ekzamenon. Por B-studado oni bezonas multe da tempo. Precipe la studado pri la literaturo estas temporaba. Oni ne kredu, ke jam sufiĉas legi ses librojn, sed oni studu ilin por akiri la kapablon juĝi pri la stila kaj gramatika valoroj de la verkoj. Ĝenerale oni suotaksas la B-studon, ne sufiĉe konsciante, ke la B-diplomo atestas instrukapablon. Tio kompreneble ne signifas, ke la diplomito disponas pri ĉiaj instruistaj ecoj. Pri tiuj ecoj disponu nepre la profesia instruisto. Sed la B-diplomito havas specialan taskon

en nia movado: li devas eduki la novajn esperantistojn; li estas la persono, al kiu studentoj sin turnas por konsiloj en lingvaj embarasoj; kaj li devas pruvi, ke li indas plenumi tiun taskon.

### 1. LA DIKTAJO

En la ekzameno la B-kandidatoj ĝenerale miras, ke kiel diktajon ili ricevas la saman taskon kiel la kandidatoj por A. Tio saĝnas al ili tro simpla. Ili sciuj tamen, ke la diferenco konsistas ne en la tasko, sed en ĝia prijuĝo. Por A-kandidato la diktajo estas juĝata kun indulgo, kaj la interpunkcio estas nur akcesora. Por B la postuloj estas plej severaj. Kandidato, kiu faras ortografiajn erarojn, nepre ne povas sukcesi. La prijuĝo koncernas precipe la interpunkcion, la skribadon de majuskloj aŭ minuskloj kaj de la propraj nomoj. Por akiri sperton en la formado kaj skribado de propraj nomoj ni konsilas studi la libreton „Eigennamen”.

### ESPERANTO-EKZAMENOJ

En 1949a la Esperanto-ekzamenoj okazos en Amsterdam kaj Groningen en Cielirtaĝo, la 26a de majo; en Den Haag sabaton la 18an de junio kaj en Utrecht sabaton la 5an de novembro. Oni anoncu sin minimume 6 semajnojn antaŭe al la sekr. f-ino H. M. Mulder, Zilvermeuwstraat 29, Badhoevedorp. Senpagan prospekton pri la ekzamenoj oni petu al nia adreso: Roelantstr. 4, Amsterdam-W.

### LA AFERO MARSAS KONTENTIGE!

Dankon pro via fervora kunlaboro, amikoj de L.P.! En la febr. n-o ni jam informis vin, ke por 1949a L.P. estas savita. Sekve de tio multaj legantoj esprimis al ni sian ĝojon. Unu ĝvidanto en nia movado aldonis: „Estus honto, se la ned. esperantistaro ne povus vivteni gazeton kiel L.P.”

Ni nun atendas la regulan transpagadon de la abonmonoj. Sed ankaŭ tio okazas kontentige, dank' al via fervoro kaj precipe dank' al la sekciaj kasistoj! Kelkaj abonantoj bonvolis pagi eĉ sumon pli altan. Koran dankon!

Nia nuna tasko estas: konservi kion ni havas, kaj zorgi, ke la sekvontjara abonantaro estu eĉ pli granda!

Administracio

### „DA” AŬ „DE”

Oni kritikis la uzon de „da” en la titolo „Nomaro da malsanoj en Esperanto” en L.P., dirante, ke „da” estas malĝusta. La kritikinto pravas, preferante „de”, se li vidas en „nomaro” formon. Sed li malpravas, nomante „da” malĝusta, ĉar la aŭtoro vidis en „nomaro” ne formon, sed kvanton. Diferenco inter „de” kaj „da” estas ofte delikata afero kaj dependas de personaj konceptoj kaj sentoj, pri kiuj disputi ne utilas.

Ĝenerale ni konsilas ne kategorie nomi malĝusta iun lingvoformon, se ĝi ne havas ies personan plaĉon. La 16 reguloj de la „Fundamento” lasas al ĉiuj sufiĉe da spaco por personaj preferoj. Se ĉiu tiras al sia flanko, por ĉiu alia sentiga manko!

